



Ekskursoj en Bayreuth

La regiono de la ĉi-jara PSI estas tre alloga regiono kun abundaj eblecoj de ennaturaj ekskursoj. Vi bone povus bicikli.

Elektraj bicikloj estas haveblaj en la turista oficejo por 35 € tage.

Nur 4 km for estas la fama granda parko "Eremitage" por migri.

Krome en la apudeco estas bestoparko, "Wilhelminenaue" kaj "Hofgarten" kun ludejo.

La malnova urbocentro invitas vin por butikumi kaj trinki kafon ktp. en diversaj kafejoj. Krome vi povus viziti per piedoj pli ol 7 muzeojn.

Ni preparis por la ĉi-jara PSI denove ampleksan kaj diversan ekskursan programon.

Dum ĉiu posttagmezo okazos diverskarakteraj ekskursoj:

Ni ĉiam renkontiĝos ekstere antaŭ la enirejo de la junulara gastejo por iri al la bushaltejo. Por atingi la ekskursocelojn vi krome povas piediri, bicikli au uzi la aŭton.

- Ekskursoj per **publikaj trafikiloj (nomitaj Px, x=cifero)** en la urbocentron (la bushaltejoj estas 10 minutojn for de la gastejo.
- **Migradoj (nomitaj Mx, x=cifero)** - piedaj ekskursoj tra la naturo.
- Kiel dum la pasintaj PSI-oj la pli longajn ekskursojn kaj la ekskursojn dum festtagoj ni aranĝas per **privataj aŭtomobiloj (nomitaj Ax, x=cifero)** de la partoprenantoj.

Ni volonte informos vin pri alternativoj, kiujn vi meminiciate povas entrepreni. Aparte ni rekomendas :

P10	Richard-Wagner-muzeo (1,5km)	https://www.wagnermuseum.de/
P10	Kunstmuseum / Arta muzeo (2km)	https://www.kunstmuseum-bayreuth.de/
P11	Iwalewahaŭs / Arta afrika ekspozicio (1,9 km)	https://www.iwalewahaus.uni-bayreuth.de/de/index.html
P12	Schlosskirche / Kastela preĝejo (1,9km)	https://de.wikipedia.org/wiki/Schlosskirche_Bayreuth
P13	Stadtbad / Urba naĝejo (2,1 km)	https://www.bayreuth.de/tourismus-kultur-freizeit/freizeit-sport-gesundheit/baeder/stadtbad/
P14	Naĝejo malgranda (1,8km)	https://www.bayreuth.de/tourismus-kultur-freizeit/freizeit-sport-gesundheit/baeder/svb-hallenbad/
A 2	Lohengrin Terme / Varmakva naĝejo (4,8km)	https://www.bayreuth.de/tourismus-kultur-freizeit/freizeit-sport-gesundheit/baeder/lohengrin-therme/

Ĉiuj celoj estas en Bayreuth:



Mardo, 26-a de marto 2024

13:00 Ekiro al la turisma oficejo (1,9 km)
P1/ M1 14.00 Komenco de la Gvidado tra Bayreuth kun Wilhelmine: 15 €/10 €

<https://www.bayreuth-tourismus.de/entdecken/fuehrungen/stadtrundgang-mit-markgraefin-wilhelmine/>



Bayreuth estas urbo kun granda historio. Ek de 1732 Wilhelmine farigis



Bayreuth kiel metropolo de arto kaj kulturo.

La gardistino rakontos multe da anekdotoj en historia vestaĵo pri sia vivo kiel markgrafino. Dum la gvidado vi povas grimpi sur la **kastelturon**.

Vi havas bonan superrigardon super la urbon.

La turo havas 44 metrojn kaj 150 ŝtupojn.

14.00 M2 Bestoĝardeno Röhrensee
(1,8 km 30 minutojn piede)
15.00 Nutrado de la bestoj



<https://www.bayreuth-tourismus.de/sehenswertes/gaerten-und-parks/roehrensee/>

Vi povas vidi 40 bestajn speciojn el diversaj regionoj de la mondo.

Estas senpaga.



Ankoraŭ
ekzistas granda ludejo en la Bestoĝardeno Röhrensee

Fotoj: © Stadtgartenamt Bayreuth





Merkredo, 27-a de marto 2024

13:00 Ekiro al la turisma oficejo (1,9 km)


P2/ M2 14.00 Komenco de la

Gvidado tra la Markgräfliches Opernhaus
(opera domo)

https://de.wikipedia.org/wiki/Markgr%C3%A4fliches_Opernhaus



Konstruita 1750 por markgrafino
Wilhelmine kaj restis ek de tiam originala.
Nun ĝi estas UNESCO-heredaĵo,
koncertejo kaj muzeo.
Enirprezoj: 11 €/ 3 €



16:00 M3 Botanika ekologia ĝardeno (Distanco: 1 km)

<https://www.obg.uni-bayreuth.de/de/index.html>

Vi povas vidi pli ol 11.000 specioj de plantoj sur 16 hektaroj kaj en varmkulturejoj (3000 kvadratmetroj).

Estas senpaga.





Ĵaŭdo la 28-a de marto 2024

13.15 M4 : Hofgarten kaj Nova Kastelo (Distanco: 1,6 km)

https://www.bayreuth-wilhelmine.de/deutsch/hofg_ns/gesch.htm

La kastelo estis konstruita 1753. Vi povas vidi faman rokokon de Bayreuth. Eblas eniri la kastelon: 5,50€ / 4,50€. La ĝardeno nun estas laŭ la angla maniero. La eniro en la Hofgarten estas senpaga.



Ankoraŭ ekzistas granda ludejo en la Hofgarten.

15.30 P3 Gvidado tra Klavierwelt (Mondo de la piano) Bayreuth kaj Franz Liszt muzeo

(Distanco: 1,7 km) Eniro: 6 €

<https://www.steingraeber.de/veranstaltungen/manufaktur-und-museumsfuehrungen-der-klaviermanufaktur-steingraeber-bayreuth/>



Jen video por rigardi rondiradon: <https://www.youtube.com/watch?v=UWngAZqhHYo>
La firmao Steingraeber konstruas ek de 1852 pianojn. En la muzeo vi povas vidi inter aliaj pianoj la pianon de Franz Liszt. Oni rajtas ludi sur la pianojn. Eble iu inter vi kuraĝas ludi por ni.



Vendredo la 29-a de marto 2024

14:00 P4 Urweltmuzeo / Pramonda muzeo
(Distanco: 1,9 km) Eniro: 1 €

<https://urwelt-museum.snsb.de/>

Grandegaj dinosaŭroj, kristaloj kaj unikaj fosilioj de saŭroj, krokodiloj, amonitoj kaj fiŝoj el la tropika malprofunda maro gvidas nin tra la historio de Oberfranken (Supera Frankonio).



16:00 P5/ M5 Wilhelminenaue
(Iama Landa ĝardeno Ekspozicio)
(Distanco: 2,8 km / Distanco de muzeo: 2,4 km)

https://www.bayreuth-tourismus.de/sehenswerte_s/gaerten-und-parks/wilhelminenaue/



La apudrivera (Ruĝa Majno) parko havas ampleksojn de 65 hektaroj kaj estas senpaga. Troviĝas kelkaj ludeblecoj tie.



Sabato, 30-a de aprilo 2020

13:00 P6 14:00 vizitado de bierfarejo:
Maizels Biererlebniswelt
(Distanco: 2,4 km)



https://www.maiselandfriends.com/de/besuche-uns/bier-erleben/bier-erlebniswelt/La_bierfarejo/ (4500 kvadratmetroj) ekzistas jam en la 4a generacio ekde 1887. Vi povas gustumi diversajn memfaritajn bierojn (21 el la barelo kaj 100 el la botelo).
Kostoj: 19 €

13:15 P7/ M6 Festspielhaus kaj Siegesturm
(Distanco: 3,6 km) Kostoj: 13 € / 8€
<https://www.bayreuth-tourismus.de/sehenswertes/richard-wagner/festspielhaus/>

La **Festspielhaus** (Opera domo) estas konstruita nur por la prezentado de la operoj de Richard Wagner, kiujn oni povas vidi dum 6 semajnoj somere. Estas unu el la plej grandaj operejoj de la mondo.



M6 Malantaŭ tiu domo 1,2 km for sur arbara monteto estas Siegesturm (turo), de kiu vi havas belegan superrigardon.





Dimanĉo, 31-a de marto 2024

5:30 (frue!) M7 6:00

Paska diservo en la Friedenskirche

(Distanco: 1,2 km)

<https://www.friedenskirche-bayreuth.de/>



13.00 Ekiro al la turisma oficejo (1,9 km) **P8/ M8 14.00** Gvidado preter
framasonaj vidindaĵoj al Freimaurermuzeo

kostoj: 15 € / 10 €

<https://www.freimaurermuseum.de/>

Framasonoj estas sekreta societo. La muzeo estas la ununura speciala muzeo en

Germanio, kiu

montras la

kulturan

heredaĵon de

la framasonaj.

Ĝi estas kaj

muzeo kaj

arkivo kaj

biblioteko. Vi

trovas

dokumentojn

de la tempo de la fondaĵo ĝis hodiaŭ.





Dimanĉo, 31-a de marto 2024

13.30 P9 / A1 / M9 Eremitage (Distanco: 4,2 km)
Senpaga

<https://www.bayreuth-tourismus.de/sehenswertes/gaerten-und-parks/eremitage/>



<https://www.youtube.com/watch?v=klqD8C0sXQ4> pri la Eremitejo

1735 markgrafo Friedrich donacis la regionon "Eremitage" al sia edzino Wilhelmine por naskiĝtago kaj en la sama jaro Wilhelmine komencis, farigi el ĝi barokan ĝardenon. Ek de 1743 Wilhelmine konstruigis diversajn konstruaĵojn en la parko: inter alie la oranĝerion, la novan kastelon, grotojn kaj akvo-ludejojn. La parko havas 52 hektarojn kaj situas sur monteto.